



Kulturaj Kajeroj

É. MAHÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

JARABONO :

Simpla : 3 fkoj } Sendotaj al : Micard Henri
Subtena : 5 fkoj } Kulturaj kajeroj
Bonfara : 10 fkoj } Epineux-le-Seguin (Mayenne)
C. C. P. Nantes 2349-62

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pagò 4)

JULIO - AÛGUSTO

1961

4

KULTURAJ KAJEROJ

1961

Julio - Aŭgusto

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatoj :

René Watier
Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesata post interkonsento kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO



D-ro Albaut skribis por vi : La latento de niaj fortoj.

Esperanto tra la mondo.

TURISMO :

Vojaĝo tra Provenco : Martigues (F. Garrigue).

Historio de la Libro.

EL IE EN LA MONDO :

Fabel - lando (G. Normann kaj A.C. Nilssen).

Malnova temo : La Atlantido.

Tra la Esperanta Literaturo : E. Boirac (S. Guillot)

Fantaziaĵo : Dimanĉa posttagmeza sonĝo

Nia posteularo (H.G. Wells. Trad. de E.W. Amos)

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.
Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

TURISMO

VOJAĜO TRA PROVENCO

III. - MARTIGUES, PROVENCA VENECIO

Ni lasu Arles, ni trairu La Crau kaj ĝiajn miraĝojn, veran afrikan dezerton kaj nur kvindek kilometrojn poste ni eniros en Martigues.

La urbo situas ĉe la renkontiĝo de lagoj Berre kaj Caronte. Tiu lasta estas nur larĝa kanalo finvenanta al Mediteraneo. Cetere ĝi disigas la urbon en tri partojn. Por trairi ĝin estas necese pasi sur du pontoj el kiuj unu estas turnoponto. La tuta martegala vivo baziĝas sur tiu turnoponto. Ne tro miru se vi devas atendi eĉ duonho-

ron por permesi la ŝipadon de barĝo, platŝipo aŭ petroŝipo. Tial, lasu vian aŭtomobilon kaj gapvagu.

La urbo allogis la pentristojn. Multaj venis inspiriĝi per la beleco de ĝiaj kajoj speguligantaj en la kvietaj akvoj de ĝiaj kanaloj. La plej fama estas Kajo Brescon. Ankoraŭ nun, ĝi dormetas kiel antaŭ jarcento, ignorante la konstantan industriaran evoluon, kiu malbeligas iom post iom tiun urbeton. Pro simileco, fare de la kanaloj, de




KAJO DE BRESCONS (Kliŝo Lucarelli, Nice)

la klimato, de la loĝantaro, kun la itala urbo, oni kromnomis ĝin « Provenca Venecio ». La komparo estas ĝusta.

Antaŭ jarcento, pentristo Felikso Ziem, iranta de sia naskiĝa Burĝonjo ĝis Italujo estis ĉarmata de la splendoro helintenso martegala, de la pentrinda urbeto. Li konstruigis domon kaj atelieron. Dum kvindek jaroj, li regule revenis por pentri. Li lasis al la urbo imponan kolekton da pentraĵoj, da skizoj. Li kreis la muzeon pri Malnova Martigues, unu el la plej interesaj provincaj muzeoj rilate la folkloron, la pentraĵojn, la ĉefverkojn de Ziem, la prezentadon de malnova kuireja meblaro de fiŝkaptistoj.

Martigues havas sian historion. En la komenco, ĝiaj tri kvartaloj, Ferrières norde, Jonquières sude, disigitaj de l'Île (la insulo) centre, estis tri urbetoj praktike sendependaj, izolataj de altaj remparoj. La propra administracio de ĉiu, la malsamaj moroj de la loĝantoj, la apartaj emblemoj kaŭzis multajn konfliktojn. Ili ofte provokis sangelversajn luktojn akompanatajn de reklamacioj apud la parlamento en Aix, provinca ĉefurbo kaj eĉ apud la Franca Reĝo.



GENERALA VIDAJO (Kliso : S.I. Martigues)

Karlo la IX-a venis pro tio ĝis Martigues sed senrezulte ; li devis kontentiĝi per konsiloj pri saĝo kaj prudento al la loĝantaro ! Lia frato, Henriko la III-a starigis la pacon inter la tri kvartaloj. La akordo estis subskribita la 21-an de aprilo 1581, en la preĝejo de Ferrières. Tiu konkordo rezultigis la unuiĝon de la tri emblemoj. Tiuj estis : blua por Ferrières. blanka por l'Île,

ruĝa por Jonquières. Tiel Martigues elmetis do la trikoloran flagon, pli ol du cent jarojn antaŭ Franca Revolucio. Tiu flago flirtos ĉie, kie Martigues havas reprezentantojn.

Sur la benkoj de la lernejo, saĝe vi lernis, ke, laŭ la instigo de Markezo de Lafayette, la franca trikolora flago devenas de la ruĝa kaj blua pariza emblemo inter kies koloroj oni lokigis la blankan de la malnovaj reĝoj.



KAJO (Kliŝo : S.I. Martigues)

Jen, probable, pura eltrovaĵo de Parizanoj, ĉar la historia rakonto tute diferencas.

En Parizo, ĉe la hotelo de la Princlando, strato Bellechasse, ĉe Markezo de Gallifet Princo de Martigues, tiu flago flirtis longtempe antaŭ 1789.

Ĝi ornamis, en la antaŭurbo Sankta Antonio, la montrofenestron de drinkejo mastrumata de Couture kaj Jacques Rivière, du Marteganoj je progresemaj ideoj. La 14-an de Julio 1789-a, la homamaso alkuras al La Bastille tra la antaŭurbo Sankta Antonio. Couture ravata de la okazintaĵo prenas sian flagon kaj marŝas kun la popolamaso. La Bastille sturme prenita oni serĉas flagon starigotan sur la supro kiel venkosignon. Oni trovas tiun de Couture tuj atingeban. Ĝi estas poste portata triumfe kaj fiere elmetita ĉe la balkono de la Urbodomo. La dinamismo de tiuj tri koloroj plaĉas al Generalo de Lafayette. Li distribuigas baldaŭ saman kokardon al siaj soldatoj. Por la datreveno de la preno de la Bastille li

ĝin prezentas al Ludoviko la XVI-a kun tiu antaŭ dira frazo : « Moŝto, prenu tiujn tri kolorojn, ili rondiros la mondon ».

Sed, kiel vi konis la aventuron de Couture ? Li mem ĝin rakontis, kelkajn jarojn post la revolucio, reveninte en Martigues.

Post la kunigo de la tri urbetoj, Martigues prosperis, superiris ĉiujn gradojn de la nobeleco : sinjorlando, baronlando, vicgraflando, princlando, fine dum la deksepa jarcento ĝi konis prosperan epokon kun pli ol 20.000 loĝantoj. Ĝi havis sian kolezion, sian tribunalon, sian komercan ĉambron.

Ve ! La fama pesto de Marseille, kiu dum 1720, difektigis tutan Provencon, damaĝis Martigues. Ĝi denove fariĝis urbeto, centro de fiŝkaptado, kun nur 6 a 7.000 loĝantoj.


En la dekaŭa jarcento, la ĉarmo de ĝiaj malgrandaj fiŝhavenoj, la gracieco de ĝia pejzaĝo inundita de emocia lumo allogis la pentristojn. Ili nomis ĝin Provenca Venecio.

Tamen la progreso ekzistas, eniĝas ĉien. La konstruo de granda fervojo, la fosado de la kanalo de Arles ĝis Bouc, la kavigo de la tunelo Rove, la instalado de la petrolo centro dum la unua kvarono de nia jarcento donis al la urbo novan impeton. Denove la loĝantaro konsistas el 20.000 urbanoj. Denove ĝi posedas sian liceon, sian instancon tribunalon.

La nuna ĉefa industrio de la regiono, la petrolo, anstataŭas la fiŝkaptadon. Lageto Berre fariĝis unu el la plej famaj centroj enhavantaj grandajn rafinejojn. La petrolo haveno Lavera, pro siaj modernaj ekipaĵoj, estas konsiderata kiel unu el la plej grandaj petrolaj havenoj en Eŭropo.

Bedaŭre, la pentrinda aspekto eminente arta, kiu kreis esceptan famon ĉe la turistoj, la pentristoj, la verkistoj, malaperas pli kaj pli. La bonan malnovan loĝantaron, vere provencan, elpuŝas nova, kosmopolita.

Se vi volas kunporti belan provencan vidaĵon supreniru la monteton kie staras kapelo « Notre Dame de la Miséricorde » (Nia Sinjorino de la Mizerikordo) por admiri ĝian unikan panoramon.



PETROL-SIPOJ (Kliŝo : S.I. Martigues)

Antaŭ viaj okuloj, lageto Berre blankiĝas matene, lazuriĝas vespere. Per siaj miloj da verdaj langoj ĝi lekas ameme la sablon de la golfetoj, rongoŝas la rokon, kie oni fiŝkaptas la triglon. Rigardu tiujn nudajn montetojn. Ili ŝvelas kiel mamoj. Flaru : ili aromas timianon, fenkolon, rosmarenon, satireon.

F. GARRIGUE.



LA HISTORIO DE LA LIBRO

Malgraŭ ĉiuj modernaj eltrovaĵoj, la libro restas unu el la ĉefaj disvastigiloj de la ideoj. Kiam nuna lernanto guas ne nur la tekston sed ankaŭ la ilustraĵojn de unu el tiuj mirindaĵoj, kiuj estas la lernolibroj, li ne pensas ke se li estus vivanta plurajn jarcentojn antaŭ Kristo, li tute ne estus lernanto aŭ estus devigata kunporti dekojn da kilogramoj da ŝtonlibroj.

Ni povus diri, ke la unuaj libropaĝoj estis la muroj de la kavernoj, en kiuj loĝis tiaj prapatroj. La desegnaĵoj tie faritaj ankoraŭ mirigas la rigardantojn. Foste, kiam la homoj ne plu esprimis siajn dezirojn kaj pensojn per desegnaĵoj sed per signoj, literoj, oni uzis kuiritajn terplatojn, kiujn oni retrovis en templaj veraj bibliotekoj en Proksima Oriento. Tio montras, ke tre longtempe la skribarto estis speco de sekreta scienco rezervita al la malpropanuloj de la primitivaj religioj. Sur tiuj terplatoj estis skribitaj longaj poemoj aŭ legendoj, aliformiĝo de veraj okazaĵoj. Sed la neceso transporti aŭ dissendi la tekstojn devigis la poetojn trovi sufiĉe facile moveblajn materiojn. Post la ŝtonoj kaj brikoj, oni uzis tabuletojn el eburo surŝmiritaj per vakso. Per speciala pinto ili oni skribis sur la vaksa tavolo. Sed la tekstoj tiel skribitaj estis neduraĵaj. La gravajn tekstojn, la leĝojn oni daŭre skribis sur ŝtono kaj bronzo.

La malkovro de la papiruso fare de la Egiptoj estis grandega okazaĵo. La papiruso estis membranca ŝelo de iu kano, kiu rolis kiel la nuna papero. La Romanoj same uzis la baston de kelkaj arboj; illoj, aceroj, platanoj. El ĝi ili faris longajn volvaĵojn aŭ kunigis la surskribitajn foliojn kaj ilin kunkudris. De la latina vorto « liber » (i.e. basto de arbo) devenas la vorto « libro ». Ĉar baldaŭ necesis havi plurajn ekzemplerojn de la sama teksto, la aŭtoroj havis plurajn kopiistojn kaj diktis al ili la skribotan tekston.

Romo per kontakto kun la de ĝi venkitaj grekaj popoloj, estis iom post iom venkita sciavice de la greka kulturo. La greka subtileco traboris la kirasojn de la brutaltaj venkintoj. La infanoj de Remus kaj Romulus alportis al Romo la bibliotekojn de Grekujo. Ekzistis grandaj bibliotekoj ankaŭ en aliaj landoj ĉefe en Aleksandrio. Bedaŭrinde la obskurantisma malaperigis multajn manuskriptojn. Nenio restus el la klasikaj verkoj kiuj nutris la modernan penson se la monaĥoj, tute izolitaj en siaj fortikigitaj monaĥejoj ne estus kopiintaj kaj tradukintaj la verkojn ŝparitajn de la militistoj. Je tiu epoko oni jam forlasis la papiruson kaj uzis pergamenojn, i.e. tanita felo de ŝafo, kapro aŭ ŝafido. Sed tiuj feloj estis tre malkomfortaj. Ne ĉiuj monaĥoj estis kleruloj; kelkaj forskrapis la skribaĵojn de siaj antaŭuloj por reutiligi la malnovajn felojn. Felice niaj modernaj rimedoj permesas reapergigi la forskrapitajn liniojn; tiu laboro estas la « decifro de palimpsesto ».

La historio de la libro stagnis ĝis la eltrovo de la presarto. Sed la papero jam ekzistis. La ĉinaj ĝin fabrikis el miksaĵo de boligitaj fibroj de morusarbo

kaj bambuo. La unua paperfabriko estis starigita en Samarkand fare de ĉinaj malliberuloj. La Araboj de Nord-Afriko iom poste fabrikis paperon el ĉifonoj.

La eltrovo de la presado per moveblaj literoj pligrandigis la bezonojn pri papero. En Francujo la protestantoj specialigis pri tiu fabrikado. Sed pro la nuligo de la Nantes-edikto ili formigris al Nederlando kaj tie restarigis siajn fabrikojn.

La elpenso de presarto estis la ekirpunkto de la scienca progreso. Sen la presarto ni ne havus la eblon multigi la librojn kaj ilin vendi je sufiĉe malalta prezo; sen disvastigo de la libroj neniu lernado estus ebla; ni povas diri, ke la elpenso de presarto estis tiel grava, kiel la eltrovo de la elektro — kaj de la atom — potenco. De tiu tempo la mondo rapide evoluis.

La gravurarto permesis tipografion. La tabul-presado anstataŭis la mandesegnadojn. Ĝi konsistis en reliefa gravurado de tekstoj kaj desegnoj sur ligna tabulo. Tiel estis ebla la reproduktado de pluraj ekzempleroj sed nur sur unu flanko de folio. La laboro estis tre longa kaj la libroj tre grandaj kaj dikaj. Dank'al Gutenberg ili fariĝis pli malgrandaj kaj pli maldikaj.

Iom post iom presarto disvastigis en tuta Eŭropo. Multaj eŭropaj urboj havis sian presejojn. Pluraj tipografoj famigis por siaj rimarkindaj eldonaĵoj. Kelkaj havis malfacilaĵojn, por religiaj aŭ politikaj kaŭzoj. La franca eldonisto Etienne Dolet estis kondemnita je morto, pardonita, denove arestita kaj fine bruligita en 1546.

Sed la homa penso estas nevenkebla. Malgraŭ la turmentadoj la prelistoj ne ĉesis sian laboron. La sekretaj eldonaĵoj plimultiĝis. La libereco de presado aperis, malaperis, reaparis pli malpli limitita laŭ la reĝimoj.

Dum la primitiva epoko teksto kaj ilustraĵo estis skulptitaj reliefe sur ligna tabulo. Post Gutenberg oni serĉis rimedojn por fari ilustritajn librojn. Oni utiligis la lignan gravuron. Oni eldonis sciencajn verkojn ĉefe per hirurgoj kun ilustraĵoj en 1497. Grüninger gravuris figurojn sur apartaj ligno-pecoj kaj poste kunigis ilin laŭ diversaj aranĝoj. La reliefa metalgravuro anstataŭis la ligno-gravuron sed nur dum kelka tempo. Poste estis elpensita la kava metalgravuro. Dürer en la 16-a jarcento sukcesis redoni la aspekton de la plum-desegno. Fine de la 18-a jarcento Senefelder elpensis la litografion, kiu konsistas en desegnado per specialaj kolorigitaj sur glata ŝtono. Acido korodas la ŝtonon krom la partoj kovritaj per la kolorigilo. Tiamaniere oni havas reliefan producon. La elpenso de la fotoarto progresis la aferon. La rimedoj pli kaj pli perfektigis kaj nun oni povas teni en manoj vere mirindajn presaĵojn. Oni pli kaj pli utiligas la ilustradon. Ĝi kelkfoje, bedaŭrinde, anstataŭas la tekston. Sed estas kuragiĝe konstati, ke oni pli kaj pli presas valorajn verkojn, kaj eĉ represas malnovajn tekstojn.

EL IE EN LA MONDO

Fabel - Lando - Nord - Norvegujo

La fabela-lando, tio estas Nord-Norvegujo. Somernokto, kiam oni vidas la krutajn kaj strangajn montojn laŭlonge de la marbordo, kuŝantaj en la lumradioj de la noktomeza suno, ne ŝajnas kiel realeco sed kiel fabelo.

Sed ankaŭ la lando malantaŭ la marbordo estas ĉarmega kaj interesa.

Dum la someroj multaj turistoj, norveĝaj kaj eksterlandaj, vizitas Nordland per ŝipo, aeroplano, trajno kaj aŭtomobilo.

Tiuj, kiuj vojaĝas norden tra la interno de Nordland eltrovas, ke Nordland estas ne nur grandioza kaj stranga marbordo, ne nur nekredible formitaj montoj kaj ŝtonoj, kiuj leviĝis el la maro. Vojaĝo tra la interna Nordland, el Trondelag al la urbo Narvik, montras novan kaj pli grandan Nordland, kiu estas tiel riĉa je impresoj de beleco kaj sangiĝoj, ke oni entuziasmiĝas.

De kiam la turisto envenas en Nordland li travojaĝas regionojn, riĉajn je kamparoj kaj arbaroj, nome Vefsn, Rana kaj supren tra Dunderlandsdalen al Saltfjellet, kie li pasas la polusan cirklon sur la

altmontaro. Sed la polusa cirklo estas neniu Limo inter sudnorvega abunda vegetaĵo kaj dezerta, arkta naturo. Sur la altebenaĵo de Saltfjellet oni rigardas la laponan oferlokon. Tio estas la lastaj restaĵoj de la malnova kaj antaŭ longe forgesita kulturo de la lapona popolo. Kaj oni veturas al novaj, belaj internaj regionoj. Unue tra Lonsdalen kie la laponoj, tiuj lastaj nomadoj de Eŭropo, havas slajn somertendarojn. Poste malsupren al Saltdalen.


La vojaĝanto tuj rimarkas la gigantan montportalon tra kiu flanka vojo kondukas al Junkerdalsura. La loko estas fama pro sia kuzloza kreskaĵo kaj tial leĝordono malpermesas al la vojaĝanto kunpreni ion. La ĉefvojo kondukas preter Junkerdalen kaj norden, malsupren tra la vastaj pinarbaroj de Saltdal al Rognan, laŭlonge de la krutegaj montflankoj de Skjerstadfjorden al la urbeto Fausske, de kie la vojo kondukas norden al la urbo Narvik, tra iuj el la plej belaj regionoj, riĉaj je altaj montoj kaj idiliaj lagoj paradizo por entuziasmaj fiŝkaptistoj.



Saltstraumen, akvoturniĝo

De Fauske flanka vojo kondukas al la urbo Bord.


Bodo estas la ĉefurbo de Nordland kaj la centro de tiu provinco, kiu jam en la mezepoko estis la plej riĉa kaj potenca en Halogaland. La urbo fondiĝis la 20-an de majo 1816, kaj tra longaj kaj streĉaj tempoj ĝi konstante laboris sin antaŭen sur sana ekonomia bazo. Bombardado en 1940 bruligis Bodo kaj pli ol du trionoj de la urbo estis tute detruitaj. Nur restis tri negocoj kaj nemulte da aliaj domoj. El la 6.000 enloĝantoj inter 3.000 kaj 4.000 perdis sian hejmon. La vundoj, kluajn al milito donis al la urbo, estas proksimume forigitaj, kaj nun Bodo estas tute nova. Estas impone kiel la urbo pligrandiĝis dum la lastaj jaroj, havante nun pli ol 13.000 enloĝantojn. La komunikiloj en Bodo estas tre oportunaj. Ni menciui ke la urbo iĝis centro de la aertrafiko al Japano.



Lapona oferlokon sur Saltfjelder

dekoracio en la belega perspektivo. Rigardante suden oni vidas Saltenfjorden, ĉirkaŭata de potencaj montoj, nome Børvasstindene, Beiertindene, Sandhornet, kaj Fugloya kiel masiva finaĵo.

Proksimume tri kilometrojn de la urbo estas la monteto Ronvikfjell, kie troviĝas kafejo. El la supro de la monto la noktomeza suno estas videbla de la 29-a de majo ĝis la 14-a de julio. Vizito sur tiu monto donas al la turisto la plej oportunan kaj mirindan superrigardon de nordlanda naturo. Per aŭtomobilo oni veturas el la urbo kaj supren zigzage laŭlonge de la montflanko al la montsupro, kaj subite aperas la rava elrigardo norden trans Vestfjorden al la sovaĝaj alpmontoj de Lofoten. En la antaŭaĵo la montinsulo Landego kuŝas kiel masiva



La montinsulo « Landego » ĉe Bodø kun noktsuno


Aŭtomobilvojo kondukas al Saltstraumen, eks-terordinare alloga turista vidindaĵo en distanco de proks. 30 km. de Bodo. Krom la sanĝiga kaj grandioza naturo Saltstraumen, la plej granda akvoturniĝo de Norvegujo, estas naturfenomeno unika en Eŭropo. Dum alfluo kaj refluo la tajdo urĝiĝas tra 3 markoloj, havante largecon de 60-150 metroj kaj longecon de 2 km. kaj versiĝas en kaj el Skjers-tadfjorden. Oni kalkulas ke tiamaniere 1 miliono kubaj metroj da akvo enfluas kaj refluas tra la markoloj 2 foje dum tagnokto. La ŝipoj devas atendi la tempon inter alfluo kaj refluo por pasi tra Saltstraumen. En la akvoturniĝo vivas multaj fiŝoj. La Straumanoj kaptas la fiŝojn el boatoj, speciale konstruitaj por veturo tie. La turisto, kiu deziras fiŝkapti, staras sur la marbordo kaj uzas fiŝstangon, kiun li prunteprenas en la Strauhotelo. La loko havas hotelon, kiu bone prizorgas la turistojn. Neniu pentos viziton al tiu giganta akvoturniĝo.

Gunvor Normann kaj Anna Chris. Nilssen.



MALNOVA TEMO

La Atlantido



La Nord-Atlantika Ĉeno proksimume konsistigus la iama Atlanta teritorio

Antaŭ kelkaj semajnoj informo aperinta en la gazetoj renovigis la « Atlantidan problemon » : ekspedicio kondukata de germana pastro kaj de franca egiptologo foriris el germana haveno por « trovi » la Atlantidan kontinenton kelkajn kilometrojn for de la insulo Heligoland, en la Norda Maro, inter Germanujo kaj Danujo. Tiu informo surprizis nin, ĉar la kutima opinio lokigas la Atlantidon en la Atlantika Oceano. Pro tio, atendante la rezultojn de tiu nova serĉado, ni opiniis interese reparoli pri la ĝis-nunaj opinioj koncerne tiun problemon.

« Teruraj konvulsioj okazis. En unu tago kaj unu nokto hororaj, via tuta armeo subite enabismigis kaj same enabismigis la insulo Atlantido en la maro kaj malaperis ». Tiamaniere esprimigis la greka verkisto Platon en « Timeo ». Laŭ tiu tradicio ekzistis en la Atlantiko grandega insulo, kiu malaperis en la akvojn proksimume 9.600 jarojn antaŭ nia erao. Sur tiu insulo vivis popolo, kiu disvastiĝis en la okcidenta parto de Eŭropo kaj en Norda Afriko. Tiu popolo batalis kontraŭ alia granda popolo nomita Atenoj. La batalo daŭris ĝis la malapero de Atlantido.

La scienco interesiĝis pri tiu problemoj kaj post elektado el la diversaj dokumentoj, proklamis racia kaj konforma je la evolucia leĝo la ekzistadon de la insulo Atlantido. Rigora studado de la tradicio kondukis al la konkludo, ke tiu insulo povis esti malaperinta iom post iom. Fine de la 19-a jarcento, okaze de la instalado de submara kablo inter Brest kaj Cape Cod, riveligis cent kilometrojn norde de la Akoroj, je profundo pli ol 3.000 metroj, la ekzistado de montaro kaj profundaĵo. Samokaze oni eltrovis erojn de bazalto, mineraloj kiu formiĝas nur en libera aero.

Geologoj kaj mineraloj konsentas pri la ekzistado ne nur de grandega montoĉeno, de Spitzbergo norde ĝis Afriko sude, sed ankaŭ de flankaj deirantaj ĉenoj paralelaj je la ekvatoro, specoj de pontoj inter la du Mondo, versajnaj restaĵoj de la hurona, kaledona kaj hercina terenfaldaĵoj. La vulkana eco de la insuloj kiuj situas sur la supozita loko de la Atlantido plifortigas la opinion pri la sangigemo de la tereno kaj la ebla enfalo de tiu tereno.

La zoologoj alportis pli gravajn pruvojn favore al Atlantido. Multaj bestoj kaj vegetaĵoj similas ambaŭflanke de la Atlantika Oceano. Tiu fakto pensigas pri iama « vojo » inter la du kontinentoj. La mastodonto, kiu ekzistis en Okcidenta Eŭropo dum la mioceno, troviĝis en Teksaso dum la pleistoceno. Oni senerare scias, ke la naskiĝloko de la elefantoj kaj de la ĉevaloj estis la Nova Mondo. Kiamaniere ili povis veni en la Malnovan? Tiu transiro de tiaj diversaj specoj, kiaj la moska bovo, la bizon, la gulo, la kastoro, la histriko et gastropodaj moluskoj, krustacoj, rampuloj, vermoj kaj insektoj, de kontinento al la alia klarigas nur per la iama ekzistado de « ponto » inter la du mondoj.

La botanikistoj aldonis interesajn elementojn al la pruvo-fasko kunmetita de la zoologoj kaj oceanografoj. Ekzemple, kiam la Hispanoj alvenis en Centra kaj Suda Ameriko, ili trovis bananarbojn. Sed oni neniam trovas en tiuj regionoj sovaĝajn bananarbojn, kaj en la Atlantikaj centraj insuloj ekzistas jam de tre longa tempo tiuj arboj kulturitaj, kio pensigas pri homoj bone konantaj la agrokulturan arton.

Fine la etnologoj studis la problemoj. Se ekzistis la Atlantido kaj la Atlantoj, se ekzistis la « pontoj », oni devas trovi en ambaŭ mondoj la posteulojn de komuna origina raso. Tre interese libro de Sro Poisson helpas klarigi la problemoj. La Guanĉoj, popolo ekstermita post la malkovro de la Kanariaj Insuloj, estis altstararaj, helhaŭtaj, helokulaj kaj blondharaj. En tiu parto de la mondo, proksime de la Afrika kontinento, la ekzistado de tia popolo estus klarigebla nur se oni supozus, ke tiu popolo konsistas el la posteuloj de la Atlantoj. La studado de la kranio de tiuj homoj ilin parencigas kun la Cromagnon-homo. En Eŭropo la Baskoj estus la posteuloj de la Atlantoj, kaj en Norda Afriko, la Berberoj.

Sur la alia flanko de la Atlantido samajn etnikajn tipojn oni trovas ĉe la « Ruĝhaŭtuloj » de Nord-Ameriko : Huronoj, Algonkinoj k. a. Kiel la Berberoj, tiuj Indianoj konstruis konusajn tendojn pentris sian korpon, kaŭrigis la kadavrojn, pentris bestojn laŭ la sama realista stilo.

La kutima opinio estas, ke la Indianoj, la Baskoj kaj la Berberoj estas posteuloj de la Cromagnon-homo, do de la Atlantoj. En la orienta parto de Eŭropo vivis homoj etnike malsimilaj, kies tipo estas la « homo de Combe Capelle ». Ĉu tiuj homoj ne estis la Atenoj, kiuj batalis kontraŭ la Atlantoj?

La Atlantido ne plu apartenas al la legendo. Laŭ la scienco ĝia ekzistado estas versaĵna. Ĝia logiko tamen estas okazo de diskutoj. Ĉu la ekspedicio al Heligoland alportos la lumon? Ni kun granda intereso atendas la rezultojn.

TRA LA ESPERANTA LITERATURO

BOIRAC Emile

Franco, doktoro pri filozofio, fama filozofo kaj rektoro de Akademio. Naskiĝis la 26-an de aŭgusto 1851 en Guelma (Algerio), mortis la 20-an de septembro 1917 en Dijon. Estis nomita rektoro de la Universitato de Grenoble (1898) kaj de Dijon (1902). Kiel filozofo, lia ĉefa verko estas lia tezo de doktoro « La Ideo de la Fenomeno » : li penis akordigi la teoriojn de du el la grandaj filozofoj : Renouvier kaj Fouille pri la substanco, la realeco de la ekstera mondo, la idealismo-fenomenismo. Li kreis la Instituton elektroteknikan de Grenoble, kaj la « pri-vinan » Instituton de Dijon. En 1900 li estis varbita al Esperanto per leteroj de Méray. Post iom da hezito li senlace laboris por Esperanto. Li prezidis la unuan Universalan Kongreson en Boulogne-sur-Mer (1905). Poste li ĉeestis ĉiujn kongresojn, krom du. Elektita de Doktoro Zamenhof, kiel Prezidento de la Lingva Komitato, li subtenis energie la fundamentajn principojn dum la Idistaj atakoj. Lia raporto al la kvara kongreso pritraktas lian partoprenon al la laboroj de la Delegacio kaj la kondukon de tiu fi.

En la lingvaj laboroj li partoprenis per gravaj verkoj, kaj lia granda Vortaro E-E-a estis unu el la plej gravaj libroj por la lingvolaborantoj. Boirac sin montris unu el mias plej bonaj stilistoj kaj spertuloj. Per sia fluanta voĉo kaj ridetante bonhumoro, kaj eble per sia psika influo, kune kun sia persona aŭtoritato, li ĝis grandan influon en la esperantistaj kunvenoj kaj estis ĉiam tre atente aŭskultata. Li fondis diversajn grupojn kaj aliris al Esperanto gravajn Universitatojn. Krom siaj multaj artikoloj en revuoj francaj (speciale en la Revuo Pedagogia) kaj esperantaj (kiel la Revuo) li verkis :

Traduko de Leibniz : Monadologio (1902).
 Ŝlosileto kvarlingva (1903).
 Perdita kaj retrovita (1905) (originalaĵo).
 Qu'est-ce que l'Esperanto (1906).
 Le Congrès Espérantiste de Genève (1906).
 Pri la homa radiado (1906).
 Traduko de Molière : Don Juan aŭ la ŝtona festeno (1909).
 Traduko de Van Dyke : la kvara Mago aŭ la alia saĝulo (1909) (en la Revuo).
 Plena vortaro E-E-a (1909).
 Le problème de la Langue internationale (1911).
 Vortaro de la oficialaj radioj (1911).
 Fundamentaj principoj de la vortaro E. (1911).

L. BASTIEN (Enciklopedio).

EL ORIGINALAĴO DE EMILE BOIRAC :

PERDITA KAJ RETROVITA

Infanoj miaj, aŭskultu tre malnovan fabelon, kion al mi rakontis mia patrino dum sendorma vespero.

LA REGA FAMILIO

En la malproksima lando estis iam reĝo, kiun oni nomis Diskareso la Fierega, tiel malhumila kaj malafabla estis lia humoro ! Malŝate ridaciis lia buŝo kaj liaj okuloj, sub flavrugaj brovegoj, pro kio ajn kontraŭfeto, ekflamis de kolero. Li vivadis ĉirkaŭata de teruro kaj malamo.

Feliĉe apud li la dolĉa kaj bona reĝino, malsevera Aristino, filino de la granda Arturo, diversis ĉirkaŭ si la parfumon de siaj virtoj. Ĉiam preta helpi al la mal

riĉuloj, ŝi havis koron plenan je kompato por ĉiuj malfeliĉuloj, kies mizeron ŝi dolĉigis kaj malsaton satigis per sia reĝina mano. Tial, kiom ofte ŝia boneco kvietigis la koleron de ŝia sovaĝa edzo ! Sed kio faris ŝin ankoraŭ pli respektinda, tio ĉi estis ŝiaj du infanoj, Rozililo kaj Orludviko. El ambaŭ, la filino, Rozililo, estis la unuenaskita. Apenaŭ ŝi atingis la dekvaran jaron, kaj sur ŝia blanka frunto kaj en ŝiaj blujaj okuloj radiadis gracieco, kiel tagiĝo en pura ĉielo. Lizo estis ŝia vera nomo, sed ŝi estis tiel rozga kaj tiel blanka, ke ĉiuj alnomis ŝin « Rozililo ». Ŝia simplanima rideto elmontris bonkorecon. Kiam Aristino eliris kune kun ŝi, la tuta popolo amasiĝis kaj vete laŭdadis ilin, pensante ke ĝi vidas anĝelojn.

Ludviko estis sepiara : eĉ li ankoraŭ havis longan kaj flugantan en la vento sian oran hararon, kiu ne konis la rondilan feron. Ho ! Kiel ĉarma infano li estis, kun senkulpa kaj pura animo ! Kiam sub la nuba frunto de Diskareso ekurmuregis fulmotondro, Luĉjo, apogante sian blondan kapon sur lian bruston, per unu rigardo de siaj amplemaj okuloj, kvietigis unumomente la vetegon. Kaj sendube en la tuta universo li estis la sola mortema estaĵo, kiun amis la Fieregulo.

LA SORĈISTINO

Jen ian tagon, la reĝo ĉasis cervojn kaj kapreolojn, rajdante en sia vastega parko tiel granda kiel arbarejo, kie la bruaro de la malproksima urbo estingiĝis.

Jam aŭtuno senfoliigis la grandajn kverkojn kaj la vojoj estis plenaj je disŝutita branĉaro... Brunruĝa agrikajo, tute ŝvelanta je veneno, sin rondlinie kaŝis sub la palega herbaro, kaj flugante tra fulmokolora ĉielo, nigra bando da korvoj eljetis sian krion funebran.

Dume, forlogita de la ĉasa fervoro, la reĝo troviĝis for de ĉiuj siaj akompanantoj, kiam subite, ĉe flesigo de voĉeto, li ekvidis maljunulinon kurbigantan preskaŭ ĝis la tero, vestitan en ĉifonojn, kiu kolektas lignon por fari el ĝi branĉofaskon.

Ŝi vidis lin alvenantan kaj silente atendis, fiksante al li siajn strigajn okulojn. Ŝia hoka nazo kaŝis la buŝon kaj mentonon, kaj ŝia duonfleksita korpo pezis sur bastonon.

Malŝate pro tiu ruzeplena rigardo, kaj mirigita pro enesto en la parko de tiu sintrudintino, la reĝo, kiun neniu ĝis tiam kuraĝis tiamaniere malmulti ekrisi al ŝi laŭtege : « Kion vi venas fari tien ĉi, maljunulino, kaj de kie vi prenis, homviziga skeleto, la kuraĝon forŝeli la lignon de mia bieno ? Kia balailo povis vin veturigi trans la murojn kaj fosaĵojn de mia parko ? Nu, forkuru de tie ĉi, kaj akcelu, sorĉistino, aŭ mi tuj sur vin jetos mian viandaman hundaron ! » Sed la maljunulino ne movis sin kaj ŝajnis esti nenion aŭdinta. Diabla rido malfermis ŝiajn maldikajn lipojn kaj per sibla voĉo : « Ho ! la plej bona el la princoj, ŝi diris, jen vi tre ĝustatempe alvenis por helpi, ke mi ŝargu tiun ĉi lignon sur mian dorson. Nu, saltu de ĉevalo, kaj kvankam mi estas maljuna kaj malbela, tamen estu afabla kaj donu al mi helpon, Via Bela Moŝto ! »

Ĉe tiu ofenda parolado, la reĝo unue paligis, poste farigis puncokolora. Starigante sur sia ĉevalo, kun okulo brilanta pro kolero : « Mia vipo pagos al vi la salajron de tia insulto ! » Li ekrisis, jam preta frapi ; sed lia brako rigidiĝis kaj ne surfalis. Stranga senforteco paralizis lian korpon.

« Reĝo, diris grince la maljunulino, lernu koni, kiu mi estas. Neniu senpune minacis Terason, kaj vi mem pri tio pentos. Adiaŭ ! »

Same kiel malreala sonĝo ĉe vekiĝo disvaporigas, tiel l'abomena maljunulino kune kun sia branĉofasko malaperis. Kaj en la neblega parko plidensiĝis malhelejo plena je misteraj bruoj kaj mallaltaj murmuroj kaj la folioj ekfalas de la movigantaj branĉoj.

Diskareso, kontraŭvole ankoraŭ tremanta, ekaŭskultis : « Dank'al Dio, mi aŭdas la sonon de la ĉaskorno. Mia hundaro alproksimiĝas. Mi iru, kaj forlasu tiujn funebrajn lokojn ».

Kaj dum en la malalta ĉielo disvastiĝas la mallumo, sekvata de ĉiuj siaj korteganoj kaj servistoj, la reĝo penseme reiris la vojon al la palaco.

LA ĜARDENO

Kial ĉiuflanke tiuj vagaj lumoj ? Tiuj plendaj voĉoj ? Ĉe l'antaŭaĵo de la nigra palaco lumas ĉiu fenestro. Ĉie, en la ĝardenoj, en la kortoj, sub la pordegoj, disvagas servistoj kaj servistinoj, portante torĉojn. Estas la horo de la dormo, kaj neniuj dormas. Tra la silento de la nokto aŭdiĝas krioj : « Orluĉjo ! Orluĉjo ! » Ĉu do la morto frapis la reĝan loĝejon, ĉar tiel malĝaje pliplegas kaj gemas la funebra sonorilo ? Ĉu la filon de

la reĝo forrabis la fatalo, apenaŭ en la mateno de lia vivo ? Sed la reĝo jam konas la malĝojegajn novaĵojn, kiu pistas lian patran koron ! Li scias, ke Orluĉjo malaperis ! Kiel okazis tiu malfeliĉo ? La infano estis ludinta la tutan matenon ; poste li elernis siajn lecionojn obeme ; poste, vespere, denove en la ĉarma ĝardeno, tute parfumita de floroj, tute kovrita de branĉetoj, li pasigis mallongajn horojn jen destrante naturajn fragojn, jen persekutante orajn papiliojn. Lia patrino apud li rigardis lian ludon per kara rigardo, kiam subite, de la ĉielo unuamente mallumigita, surfalis nubo kvazaŭ vastega vualo, kaj nokto kovris ĉion. Tio ĉi daŭris nur unu momenton, daŭron de fulmo, sed kiam la tago reaparis, ho ve ! Orluĉjo jam ne estis apud sia patrino ! Aristino sin deturnas kaj pensas, ke ŝi sonĝis. « Ĉu li forkuris ? Ĉu oni lin forrabis ? Orluĉjo forrabita ! Ne, tio ne estas ebla ! Tion Dio ne permesus ! Ne ! Ne ! Li ne estas for ! Kie li povas sin kaŝi, la infano, la ludema infano, kiu devigas min tiamaniere serĉi ? En tiu ĉi arbareto, eble ? Ho, mortiga timo ! Tie li ne estas. Filo mia, kompату miajn larminoj ! Finu tiun ĉi kruelan ludon ! Orluĉjo ! Orluĉjo ! »

Sed vane la patrino vokas, vokas denove. Neniu respondas, kaj jam la nokto falas sur la floran ĝardenon mutan kiel tomo !

FANTAZIAĴO

Dimanĉa Posttagmeza Sonĝo

Ĉu mi rakontu al vi, kio okazis al mi nun dimanĉe posttagmeze ?

Mi legis kelkajn eksterlandajn leterojn, sciigojn kaj inter ili de mia korespondanto, instruisto A. Ribot, el Marmande, kiu rakontis, kiel li vojaĝas tra Francujo kaj faras paroladojn en lernejoj al gemanantoj pri Esperanto. Sed subite mi sentis lacecon kaj vole nevole kuŝiĝis sur la kanapon. Mi deziris iom ripozi. Pli frue mi devis multe skribi por la paŝmovado. Mi volis akiri novan forton. Sed kio okazis ? Subite al mi ŝajnis, kvazaŭ mi vidus samideanon Ribot en lerneĉambro kaj kvazaŭ li vokus infanojn : « Venu proksime al mi, Edmond, ankaŭ vi, Pierre, André, kaj Janine, Louise kaj aliaj. Vi lernas la internacian lingvon kaj nun vi aŭdos belan fabelon de ĉarma knabino. » La geknaboj scivole alproksimiĝis. « Kie estas la knabino ? » ili demandis. « Vi ne vidus ŝin, sed vi tuj aŭdos ! » Ili sidis ĉirkaŭ tablo. Sed trange, nun mi aŭdis voĉon de samideano Joël Vilki el la finna urbeto Somero : « Venu, Anni, venu Yrjö ! Vin vokas koboldo el malproksima lando » Nigraharaĵ knaboj en bulgara ĉambro sidis apud sia patrino, kiu ridetante diris : « Nun silentu Petkov, Boris ! » Mi komencis miri ! Kio estas tio ? Sed mi ne povis multe pripensi ! Jam Hans kaj Kurt kaj Grete en germana urbeto, Luigi kaj Mario en itala hejmo, kaj Serjoza en Leningrado kaj Matko en slovena vilaĝo, el la dekjara Vladislav en Ostrava donis signon : silentu ! Ili streĉis siajn orelojn. Sed kie ? Kion ? En tiu momento samideano Szerdahelyi en Budapeŝt diris al knabo : « Ĝeza ! Nun ŝaltu la aparaton ! » Nun mi rimarkis, ke inter

la infanoj ekaperis ia mirinda, brilanta, sorĉa, granda katolo, ĉirkaŭ kiu vibris la stranga, agrabla brilo. Kaj mi vidis, kvazaŭ ĉirkaŭ la sama sorĉkatolego sidus blondaj kaj brunaj kaj nigraj geknaboj el diversaj partoj de Eŭropo, eble eĉ el alia mondparto... Tiam subite aŭdiĝis feina muziksono. Ĉiuj streĉe aŭskultis kaj atendis. Kaj nun mi ankaŭ aŭdis vortojn.

« Karaj infanoj ! Nun aŭdu vi la sorĉan voĉon de Varsovi... »

La etaj aŭskultantoj ekmoviĝis ! Unu puŝis la kubuton de la alia ! Alia triumfe rigardis sian patron. Tria ĝoje flustris : « Kiel bone, ke mi lernas Esperanton ! Jen mi komprenas ĝin ! » Kaj el la mirinda aparato sonis infana voĉo de pola knabino. Si estis nevidebla kaj tamen kvazaŭ ŝi sidus inter la geknaboj, inter la infanoj de la tuta mondo kaj fabelus al ili en unu lingvo. Kaj mi mire vidis, ke ilin ĉiujn kunligas belegaj, diverskoloraj, argentaj, oraj, brilaj, bonodoraj, mildaj fadenoj, rubandoj, ke inter ili ŝuebas floroj, ke al ili flugas jen ĉi-tien, jen tien birdetoj diverskoloraj, mirindaj, ke ilin ĉirkaŭbrakumas ia bonvola, amika, ŝirmanta, paca anĝelo per grandegaj, travideblaj, diafanaj, blankaj flugiloj.

Kaj en tiu momento mi vekigis ! Sed ĉu estis sonĝo ? Ja en mia ĉambro sonis la radio — mia edzino sekrete ŝaltis ĝin kaj mi aŭdis la konatan voĉon « Parolas Varsovio, naskiĝturbo de Esperanto... » kaj ankaŭ mi povis aŭskulti la fabelon de pola knabineto !

Pal BALKANYI.

POR VIA DISTRO

Konkurso 1960-61 Rezultoj

Jen la rezulto de nia konkurso :

Gajnis la **1-an premion** (2 semajnan restadon en Grésillon) Sro Roger MILON, 49, avenue Alsace-Lorraine, Brive (Corrèze) kiu sumigis 124 poentojn (la maksimumo estis 130).

Gajnis la **2-an premion** (unu semajnan restadon en Grésillon) Sro Ernst MUTHSCHALL, Am Bergmannströ 18, Haale (Saale) D.D.R., kiu sumigis 116 poentojn.

Jen la listo de la sekvantaj konkursintoj :

- 3 — Sro Maurin (Francujo) 114 poentojn.
- Sro Suchareau (Francujo) 114 poentojn.
- 4 — Sro Salasc (Francujo) 112 poentojn.
- 5 — Fino Carré (Francujo) 110 poentojn.
- Fino Hanson (Britujo) 110 poentojn.
- 6 — Sino Guinot (Francujo) 109 poentojn.
- 7 — Fino Beaubonne (Francujo) 108 poent.
- 8 — Fino Arnould (Francujo) 106 poentojn.
- Sino Laurie (Britujo) 106 poentojn.
- Sino Lenel (Francujo) 106 poentojn.
- 9 — Sino Benazet (Francujo) 104 poentojn.
- 10 — Sino Vincent (Francujo) 92 poentojn.
- 11 — Sro Vidal (Hispanujo) 86 poentojn.
- 12 — Fino Robin (Francujo) 80 poentojn.
- 13 — Sro Wieshofer (Aŭstrio) 78 poentojn.

ktp...

Estas bedaŭrinde, ke kelkaj konkursantoj ne respondis ĉiujn problemojn. Ĉiujn mi kore dankas kaj gratulas, kaj al la malfeliĉuloj mi donas rendezvuon venontan oktobron.

P. CHEVALIER.

Amuzaj Problemoj (de S-ro Jarlier)

SOLVO DE LA LASTAJ PROBLEMOJ

La ĉefkuiristo kaj la kuirknaboj :

La ĉefkuiristo donas al la unua

$$\frac{63}{2} + \frac{1}{2} = \frac{64}{2} = 32 \text{ ovojn.}$$

Restas 31 ovojn. Al la dua li donas :

$$\frac{31}{2} + \frac{1}{2} = \frac{32}{2} = 16 \text{ ovojn.}$$

Restas 15 ovojn. Al la tria li donas :

$$\frac{15}{2} + \frac{1}{2} = \frac{16}{2} = 8 \text{ ovojn.}$$

Restas 7 ovojn. Al la kvara li donas :

$$\frac{7}{2} + \frac{1}{2} = \frac{8}{2} = 4 \text{ ovojn.}$$

Restas 3 ovojn. Al la kvina li donas :

$$\frac{3}{2} + \frac{1}{2} = \frac{4}{2} = 2 \text{ ovojn.}$$

Restas 1 ovo. Al la sesa li donas :

$$\frac{1}{2} + \frac{1}{2} = 1 \text{ ovon.}$$

Restas neniu ovo. La nombro de la kuirknaboj estas 6.

Kontrolo : $32 + 16 + 8 + 4 + 2 + 1 = 63$.

La horloĝo kiu rapidas :

Post unu tago kaj unu nokto la horloĝo fruas je : $1/3 - 1/4 = 4/12 - 3/12 = 1/12$.

Oni povus diri : $2 : 1/12 = 24$. Sed tiu ne estas bona solvo.

Efektive, post 20 tagoj kaj 20 noktoj la horloĝo havus fruan de : $20/12 = 5/3$ minuto.

Unu nokton poste ĝi havos fruan de :

$5/3 + 1/3 = 6/3 =$ minutoj. La respondo estas : 20 tagoj kaj 21 noktoj.

NOVAJ PROBLEMOJ

Nombroj inversigitaj : La diferenco inter nombro formita per tri sinsekvaj ciferoj kaj tiu nombro inversigita estas 198. Pruvu tion !

Al ĉiu sia pagparto : Kelkaj amikoj prenas manĝon komune. Ili konstatas, ke, se ĉiu pagus po 640 frankoj, mankus 420 frankoj. Male, se ĉiu pagus po 720 frankoj, estus 140 frankoj troe. Kiu estas la nombro de la amikoj kaj la prezo de unu manĝo ?

La fratinoj, kiuj ne estas parencoj : Ĉu du virinoj povas havi saman fratinojn kaj ne esti parencoj ? Jes. Pruvu tion.

ĈU ANKAŬ VI, LEGANTINO ?



Nia Posteulato

« Post momento mi staris vizaĝon kontraŭ vizaĝo, mi kaj tiu ĉi malforta estaĵo el la estonto. Li venis rekte al mi kaj ridis en miajn okulojn. La manko de ia timo en lia mieno trafis min tuj. Tiam li turnis sin al la du aliaj kiuj sekvis lin kaj parolis al ili per stranga kaj tre dolĉa kaj flua lingvo.

« Aliaj venis, kaj baldaŭ ĉirkaŭis min malgranda grupo de eble ok aŭ dek el tiuj ĉi elegantaj hometoj. Unu el ili alparolis min. Estas strange, ke venis al mi la penso, ke mia voĉo estas tro rauka kaj basa por ili. Mi tial skuis la kapon, kaj, indikante miajn orelojn, reskusis ĝin. Li antaŭenpaŝis, hezitis, kaj tiam palpis mian manon. Tiam mi sentis aliajn molajn fingretojn sur mia dorso kaj ŝultroj. Ili volis certiĝi, ke mi estas reala. En tio estis nenio timiga. Efektive, estis io pri tiuj ĉi belaj hometoj, kio inspiris konfidon — gracia gentileco, ia infana naiveco. Plue, ili aspektis tiel malfortikaj, ke supozeble mi povus disjetti la tutan dekduon kiel keglojn. Sed mi faris subitan movon por averti ilin, kiam mi vidis iliajn rozkolorajn manetojn palpi la Tempo-maŝinon. Feliĉe, tiam, kiam ne estis tro malfrue, mi pensis pri danĝero, kiun mi antaŭe forgesis, kaj klinante min super la relojn de la maŝino, mi malŝraŭbis la ilojn kiuj funkciigas ĝin, kaj metis ilin en mian poŝon. Tiam mi turniĝis ree por eltrovi kio estas farebla rilate al komunikado.

« Kaj tiam, rigardante pli zorge iliajn trajtojn, mi vidis pliajn strangaĵojn en ilia Dresden-porcelana beleco. Ilia hararo, kiu estis regule bukla, subite finiĝis ĉe la kolo kaj la vango; estis nenia signo de ĝi sur la vizaĝo, kaj la oreloj estis neordinare etaj. La buŝo estis malgranda, kun helruĝaj, iom maldikaj lipoj kaj la mentoneto finiĝis en pinto. La okuloj estis grandaj kaj mildaj; kaj (eble ŝajnas egoisme) mi imagis eĉ tiam, ke estas ia manko de la intereso, kiun mi atendis trovi ĉe ili.

« Ĉar ili ne koplodis interkomuniki kun mi, sed nur staris ĉirkaŭ mi ridetante kaj parolante inter si en mallaŭtaj, dolĉaj sonoj, mi komencis la konversacion. Mi fingre montris la Tempo-Maŝinon kaj poste min. Tiam, pripensante momenton, kiel esprimi la tempon, mi indikis la sunon. Tuj iu beleta malgrandulo purpure kaj blanke vestita sekvis mian geston kaj tiam mirigis min imitante la bruon de tondro.

« Dum momento trafis min surprizego, kvankam la signifo de lia gesto estis sufiĉe klara. La demando abrupte venis en mian menson: ĉu tiuj ĉi homoj estas stultuloj? Vi povas apenaŭ kompreni kiel tio impresis min. Mi ja ĉiam supozis, ke la homoj de la jaro okcent dumil estos nekredeble pli lertaj ol ni rilate al scio, arto, ĉio. Tiam unu el ili subite faris al mi demandon, kiu montris, ke li estas sur la intelekta nivelo de unu el niaj kvinjaraj infanoj — demandis al mi, fakte, ĉu mi venis de la suno dum fulmotondro! Ĝi liberigis la juĝon, kiun mi estis prokrastinta, pri iliaj vestaĵoj, iliaj malfortaj, neppezaj membroj kaj kadukaj trajtoj. Ekfluo de seniluziigo trarapidis mian menson. Dum momento mi opiniis, ke vane mi konstruis la Tempo-Maŝinon.

« Mi kapjesis, indikis la sunon, kaj donis al ili tiom realan imiton de tondro, ke ili ektimis. Ili ĉiuj faris paŝon malantaŭen kaj riverencis. Tiam unu venis ridetante al mi, portante ĉenon el belaj floroj tute novaj al mi, kaj metis ĝin ĉirkaŭ mian kolon. Ili akceptis la geston kun melodias aplaŭdo; kaj baldaŭ ili ĉiuj kuradis tien kaj reen por kolekti florojn, kiujn ili ridetante jetis sur min ĝis mi estis preskaŭ florkovrita. Vi, kiuj neniam vidis similajn, apenaŭ povas kompreni, kiajn delikatajn kaj mirigajn florojn jarmiĝoj da kulturo estis kreintaj. Tiam iu sugestis, ke ilia ludilo estu elmontrata en la plej proksima konstruaĵo, kaj sekve oni kondukis min preter la sfinkso el blanka marmoro, kiu ŝajne rigardis min la tutan tempon kun rideto pri mia miro, al vasta griza konstruaĵo el ĉizita ŝtono. Irante kun ili, mi kun nerezistebla amuzo memoris miajn memfidajn esperojn pri profunde serioza kaj intelektala posteularo. »

(El « La Tempo-Maŝino » de H.G. Wells.

Tradukita de E.W. Amos.

Eldonita de The Esperanto Publishing Co

(Epoko-Serio).

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (20 aŭst. ŝil.).

Belgujo : F-ino S. Obozinski, avenue Brugmann 364, BRUXELLES 18.

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (6 ŝil.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (2,5 guld.).

Germanujo (Okc.) : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr, 33 - pĉk : Frankfurt (M) : 234-759 (3 mark.).

Germanujo (DDR) : S-ro Ernst Muthschall, 19a HALLE (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (5 mark.).

Hispanujo : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (40 pes.).

Italujo : S-ro Claudio Pontederà, Via Marco Polo 3A, Verona (450 liroj).
Itala Esperanto-Federacio, Corso G. Galilei, 22, TORINO.

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg 56, LAMBERTSEDER (6 kr.).


Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, Kopenhago K (6 kr.).

Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (30 Złotoj).

Svedujo : S-ro Rune Palmgren, Persikogatan 32 III, Stockholm-VALLINGBY (4 kron.).

Svislando : S-ro Pierre Metivier, Via Ferrera, Ascona (Tes.) (3 sv. Frank.).

Aliaj Landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (11 st.), aŭ respondkuponoj (8 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponon al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo